

La historio verŝajne ne plu absolvos lin¹

Senlegenda biografieto pri Fidel Castro Ruz
en la kunteksto de la politiko kaj ideologio

Deveno kaj familio

Fidel Alejandro Castro Ruz naskiĝis oficiale la 13an de aŭgusto 1927² en la bieno de la patro en Birán (apud Mayarí, provinco Oriente, nuntempe provinco Holguín) en la ekstrema nordoriento de Kubo. La familio apartenis al la pli altnivela socia tavolo. La patro, Ángel Castro y Argiz, kiu naskiĝis en malriĉa familio en Galicio (Hispanio), venis dum la sendependiga milito de la kubanoj en 1895 kiel soldato de la hispana kolonia armeo sub generalo Weyler al Kubo por tie subpremi la kuban ribelon. Post la hispana kapitulaco li reiris al Hispanio sed revenis en 1906 al Kubo por definitive resti sur la kariba insulo kaj por serĉi kaj trovi sian bonŝancon kiel sukera komercisto. Laŭ priskribo de samtempoj al liaj karakteraj trajtoj apartenis: inteligenteco, organiza kapablo, persista laboremo, disciplino, grumblemo, malavaro, humanitaro. Laŭ alia, pli kritika fonto la patro estis kruda tipo, inklinis al perforto kaj kutime kverelis kun la najbaroj, li eĉ estis kulpigita pro murdo al iu laboristo. Fidel poste memoris, ke la malfeliĉa situacio de la laboristaro en la kamparo impresis lin kaj vekis en li sentojn pri justeco kaj ribeleco. Kiam patro Ángel forpasis (1956) oni taksis lian posedaĵon je duonmiliono da dolaroj (777 hektarojn li posedis kaj pliajn 9712 hektarojn li luprenis). Sed Ángel posedis ankaŭ gastejon, telegrafejon, vendejojn por viando kaj pano, plurajn metiejojn kaj malgrandan lernejon. Kun la unua edzino María Luisa Argota, Ángel Castro havis du infanojn, Emilio kaj Lidia. Sed la patrino de Fidel kaj de liaj ses gefratoj Angela (Angelita), Ramón, Raúl, Juana (Juanita), Enma kaj Agustina estis alia virino: Linda (aŭ Lina) Ruz González, kiu laboris kiel domhelpantino ĉe la patro ĝis la morto de María Argota. Tiun duan virinon Ángel Castro edzinigis nur en 1941³. Ambaŭ virinoj estis senalfabetulinoj. Fidel Castro do estis infano el ekstergeedzeca rilato. Dum la rilatoj de la infanoj al ties gepatroj estis karakterizitaj kiel malfacilaj, la rilatoj inter la gefratoj mem devis esti sufiĉe bonaj. La persona nomo ‚Fidel‘ ŝajne devenas de Fidel Pino Santos, kiu estis amiko de patro Ángel. Ĉar Fidel ne estis baptita post sia naskiĝo, oni primokis lin en la lernejo kiel ‚judon‘. Kiam li tamen estis baptita en la oka jaraĝo, li ricevis la nomon Fidel Hipólito Ruz laŭ la baptopatro Luis Hipólito Alcides Hibbert, kiu estis la haitia konsulo kaj konato de la familio, ĉe kiu Fidel loĝis portempe. La nomo Castro ne aperis en la bapto dokumento, ĉar la patro ankoraŭ ne agnoskis siajn infanojn, kiujn li havis kun Lina Ruz González. Nur en 1943 li ricevis sian definitivon nomon Fidel Alejandro Castro Ruz. Oni rakontis, ke Fidel reagis al la morto de sia patro kun stoika indiferenteco.

¹ Aludo al la citaĵo de Fidel Castro: „La historo absolvos min“.

² Koncerne lian naskiĝjaron ŝajne okazis manipulo, tiel ke oni ne scias definitive, ĉu Fidel Castro naskiĝis en 1927 aŭ en 1928. Laŭ alia teorio la jaro 1927 devenas el sovetia biografio. En letero de Fidel Castro el la jaro 1940 al Franklin D. Roosevelt li asertis, ke li estas 12-jara, kio signifus, ke li naskiĝis en 1928.

³ Nathaniel Weyl (1963) indikis, ke la dua geedziĝo ne estis validigita.

Lernejo, studado, profesio kaj geedziĝo

Unue Fidel vizitis malgrandan vilaĝan lernejon en Mayarí, poste la lernejon La Salle en Santiago de Cuba. Aŭ pro lernejaj meritoj, aŭ ĉar la knabo estis malfacile edukebla kazo por la tieaj instruistoj, en 1942 Fidel estis transdonita al la prestiĝa lernejo Belén en Havano, kiu estis gvidata de jezuitoj. Ĉi tiun lernejon vizitis ankaŭ lia frato Raúl. La plej ŝatataj fakoj de Fidel estis historio, lingvoj kaj sporto. En tiu tempo li konatiĝis kun la verkaĵoj de José Martí,⁴ el kiuj li poste ĉiam ŝatis citi. Laŭ propra klarigo, de la jezuitoj Castro lernis sincerecon kaj severecon. Post la abiturientiĝo en 1945 Castro komencis studi juron en la universitato de Havano, ĉar li celis defendi la justecon. Tie li atentigis pri si per politika engaĝiĝo, apartenante al iu grupo, kiu estis konata kiel ‚Los muchachos de gatillo alegre‘ (la facilpafaj knaboj aŭ simile). Malofte sen pistolo en la poŝoj, Castro fariĝis prezidanto de la Asocio de juraj studentoj, fondis studentan komisionon kontraŭ rasa diskriminacio kaj aliĝis en 1947 al la t.n. Ortodoksa Partio de Eduardo Chibás, kiu kontraŭbatalis la koruptan registaron de Carlos Prío Socarrás, pledante por adekvata politiko, kiu respektus la naciajn interesojn. Malgraŭ alta staturo, pasio kaj oratora kapablo, Fidel komence tute ne sukcesis ludi la gravan rolon, kiun li revis ludi. Dum Fidel tiam konsideris sin ‚utopia socialisto‘, lia frato Raúl fariĝis komunisto. En 1948 Fidel edziĝis al Mirtha Díaz Balart, studentino pri filozofio, kiu naskis la filon Fidelito. Post la sukcesa studfino en civila juro kaj socisciencaj fakoj en 1950, Castro doktoriĝis kaj aliĝis al iu advokata oficejo por samtempe pretigi sin por la politika kariero. En la jurista praktikejo li laboris ĝis 1952. Kiam Fidel enprizoniĝis post la Moncada-procezo (1953), la geedza paro divorcis.

La tempo en Kubo antaŭ Fidel Castro

En la jaro 1940 Fulgencio Batista y Zaldívar (1901-73) estis elektita kiel prezidento de Kubo. Sed en la elektoj de 1944 Batista ne plu povis kandidatiĝi, kaj lia deĵoranta ĉefministro estis promociita. Sed la balotojn venkis la burĝa kandidato Grau. Batista dume retiriĝis de la politiko kaj iris al Florido. En 1948 Batista revenis al la kuba politiko kaj estis elektita kiel senatano, tamen sen politika influo. Samtempe li fariĝis lobiisto de la usona mafio, kiu transformis la kuban ĉefurbon al delekta paradizo por nordamerikaj turistoj kaj por eviti la usonan justicon. Vide al la balotoj de 1952 Batista fondis propran partion, sed ne sukcesis trovi sufiĉan apogon de aliaj partioj por formi koalicion. Sekve Batista akceptis la proponon de kelkaj oficiroj lanĉi armean puĉon, kio funkciis glate dum la karnavala tempo – tiel ke prezidento Carlos Prío Socarrás fuĝis tra Meksiko al Usono. Kvankam Usono estis surprizita de tiu puĉo, ĝi finfine tamen agnoskis la registaron de Batista. Nun alvenis la tempo de Fidel Castro: li jure plendis kontraŭ Batista pro rompo de la konstitucio, sed vane. Kiam la jura vojo fiaskis, Castro komencis organizi la perfortan reziston kontraŭ Batista. En somero 1953 li pretigis centkvindekon da junaj homoj, ĉefe studentoj, por entrepreni tre riskan subteran aventuron. Samtempe oni planis ataki la kazernon de Moncada en Santia go, en la

⁴ José Julián Martí y Pérez (1853-95), estis fama kuba politikisto, ĵurnalisto, filozofo, poeto kaj nacia heroo, kiu pereis dum la sendependiga milito de 1895.

oriento de la insulo. Castro esperis, ke elde oriento kreskos la ribelo kaj devigus la diktatoron demisii. Sed la tuta entrepreno malsukcesis jam en la unua stadio de la atako. Kiam la junaj diletantaj ribeluloj foruzis sian municion, ili estis venkitaj de la soldatoj kaj la plimulto el ili mortigitaj, post terura turmentado, kiu fariĝis tutlande konata, ĉar publike efektivigita kun la partopreno de Batista-soldatoj kaj anoj de la sekreta servo. Fidel kaj kelkaj kompanjeroj sukcesis eskapi la buĉadon, sed iom poste estis tamen kaptitaj kaj povis resti vivaj nur dank' al la interveno de la ĉefepiskopo de Santiago, kiu estis simpatianto de la familio Castro, kaj de kelkaj raciaj soldatoj. Post sia aresto Castro estis transdonita al la justico. La 16an de oktobro okazis la jura proceso en Santiago de Cuba. En sia fama defenda parolado Castro prononcis la frazon „La historio min absolvos!“ (hispane: „La historia me absolverá!“). En tiu parolado li skizis la kvin punktojn de sia ‚frukastrisma‘ programo: 1e: revalidigo de la konstitucio de 1940; 2e: disdonado de la terposedo al etkampanoj kun rekompencado de la ĝisnunaj posedantoj; 3e: 30-procenta gajno-partopreno de la laboristoj en grandaj entreprenoj; 4e: 5-procenta gajno-partopreno de la sukerkanaj kamparanoj en la rikoltoj kaj garantio de minimuma kvoto por malgrandaj sukerplantistoj; 5e: konfiskado de neleĝe akaparita posedo pere de specialaj tribunaloj. La programo de Castro estis tiom radikala por plibonigi la strukturojn de la kuba ekonomio, kiel ĝin proponis ankaŭ la Internacia Banko por rekonstruado kaj evoluado. Do, tute ne temis pri ‚socialismo‘, ‚marksismo‘ aŭ eĉ ‚komunismo‘, sed pri reformo en la direkto de la ekvilibrita meztavola societo de malgrandaj proprietuloj. La politika parto de la „programo de Castro“ evidente antaŭvidis la revenon al la konstitucieco kaj ŝtata jureco, la restarigon de la civitanaj rajtoj kaj la politikan demokration. Sed la programo inkluzivis ankaŭ la ideon, ke tiu demokratio ne estu restarigita pere de la tuteco de la popolo, sed pere de la „batalantaj amasoj“, kio kongruis kun la ideoj de la ortodoksoj, formante la bazon de la pli posta kastrismo.

La nova vivo de Fidel Castro

En oktobro 1953 Castro estis kondamnita al punaresto por 15 jaroj en prizono sur la pinia insulo (poste: Insulo de la Junularo). Sed la arestaj kondiĉoj estis kompare mildaj – tiel ke eblis flegi kontaktojn kun eksteruloj kaj aliri la literaturon. Laŭ propra klarigo, en la malliberejo Castro trovis novan vivosencon, la „terura lernejo“ de la malliberejo formis la mondkoncepton de Castro, tiel ke li povis komenci novan vivetapon, ja novan vivon enute, kaj li eksentis la emon sinoferi kaj batali por pli bona, pli justa vivo, kiu ne nur limiĝas je la mizeraj bagateloj de komforto kaj profito. Li volis ŝanĝi sian landon fundamente. Okaze de ĝenerala amnestio, la 15an de majo 1955 Castro estis liberigita kaj iris al Meksiko, kien sekvis lin 82 samideanoj, por kolekti la necesajn fortojn kaj prepari la deeksteran invadon de Kubo. Sub la gvido de la hispana eksgeneralulo Albert Bayo, kiu partoprenis la hispanan enlandan militon flanke de la respubliko kontraŭ Francisco Franco, komenciĝis la arma trejnado de la ontaj kubaj gerilanoj. Tie Fidel renkontis ankaŭ la argentinan kuraciston Ernesto Guevara, poste nomata ‚Ĉe‘. Kiam Fidel forlasis la Ortodoksan Partion, li fondis kune kun siaj kompanjeroj la propran Movadon de la 26a de julio (M-26-7). Ĝia strategio estis la subtera armita batalo kun la celo disvastigi la ĉelojn tra la tuta lando. La 25an de novembro 1956 Fidel startis kun

Ĉe Guevara, Camilo Cienfuegos kaj lia frato Raúl kaj 78 aliaj revoluciuloj el Tuxpan per la jaĥtoŝipo 'Granma' en la direkto de Kubo, kie la 2an de decembro 1956 oni atingis la kuban bordon ĉe la Poroka Golfo. Sed la katastrofo, kiu atendis la invadintojn, estis kruelega: nur 12 el 83 el ili travivis la kontraŭatakon de la registaraj 'bonvenigantoj', tiel ke alian eblon ol fuĝi en la montaron de Sierra Maestra ili ne havis. La gazetoj tiam anoncis ilian pereon. Kiel *Comandante en Jefe* Fidel Castro nun persone gvidis la membrojn de M-26-7, kiuj en la montaro de la provinco Oriente fariĝis veraj gerilanoj. Tiam la trajtoj de Fidel Castro profunde ŝanĝiĝis: de la sentema, honesta, 'akademieca' kaj disciplinita revolucia strategiulo li fariĝis la kaprica, ne plu prikalkulebla aventuristo. La celo de la gerilanoj, kies modelo estis la maoisma koncepto, estis la konkerado de la urboj elde la montaro kaj kamparo. Cetere, la ĉefo de la urba M-26-7 estis la konvinkita antikomunisto Frank País, kiu en junio 1957 estis likvidita de la polico de Batista. Tiu incidento kaj vakuo kaŭzis ĉe la ribela armeo de la barbuloj en la montaro militan elitajn konscion, kiu ĉe Castro estis kombinita kun forta antipatio kontraŭ la grandurbo en si mem (Havano). Sed la kriteriaro por ke tiu ribela armeo venku, estis plurobla: ekzemple Castro devis certiĝi, ke Usono ne invados la insulon favore al Batista. En tiu senco Castro evitis ĉion, kio povis damaĝi liajn estontajn politikajn intencojn kaj faris ĉion por diskrediti Batistan antaŭ la publiko. La metodo de Castro konsistis en aro de provokoj, kiuj estis responditaj de kreskanta kontraŭteroro. Sed tiuj teroraj rimedoj perdigis al Batista sian plej lastan krediton ĉe la popolo, kaj la tempo, en kiu li ankoraŭ povis esperi, ke lia regado estos konfirmita en liberaj balotoj (en somero 1957) rapide pasis. Castro utiligis sian psikologian kapitalon kaj fine triumfis super komplete senmoraliginta, pasiva kaj korupta malamiko. La popolo observis la iom-postioman disfalon de la polica kaj armea aparato de la ŝtato kun kreskanta simpatio por la ribeluloj el la montaro, kiuj ŝajnis daŭrigi la naciliberigan lukton de la kubanoj kaj kiuj, kompare kun la batistanoj, respektis la posedaĵon de la malgrandaj homoj. Alia ruza taktiko de Castro konsistis en tio, ke li prokrastis konsenti pri unuiga kontrakto kun la internaj aliancitaj opoziciuloj, ĝis kiam lia propra movado M-26-7 estis sufiĉe forta kaj ne plu ekzistis la danĝero, ke liaj konkurentoj povus profiti de la meritoj de la movado de Castro. Post kiam la premo por Batista tamen fariĝis tro forta, la sindikatoj kaj burĝaj demokratoj alprenis la kontraŭan flankon kaj Usono lanĉis embargon kontraŭ Kubo post masakro al opoziciuloj; Batista cedis kaj la unuan de januaro 1959 forlasis la insulon kaj eniris la Dominikanan Respublikon. Malgraŭ tio Usono ne subtenis la revolucion de Castro kaj daŭre defendis la malnovan reĝimon. Samtage Castro okupis la urbon Santiago kaj la kazernon de Moncada, avancis en la direkto de la ĉefurbo kaj post ĝia okupado far Camilo Cienfuegos eniris ĝin por triumfe venki kaj sen devi dividi sian venkon kun aliaj. La venko super la tirano Batista estis aplaŭdita de la popolo, ĝia entuziasmo por la venko de la nigrabarbulo kun la olivverda uniformo grandega, tiel ke pri Castro oni baldaŭ parolis pri la nova Simón Bolívar.

Kubo sub la gvido de Fidel Castro

Kvankam Castro unue hezitis akcepti ŝtatan oficon, li decidis de facto la aferojn de la ŝtato, tiel ke sen lia aprobo nenio okazis kaj liaj ministroj nenion faris. Post la demisio de la ĉefministro Castro mem transprenis la oficon de la ĉefministro. Koncerne la

sintenon vidalvide de Usono, komence Castro ne kontraŭis ĝin, kaj li eĉ ricevis subtenon el Usono. Lian unuan oficialan viziton li faris al Usono, kie malgraŭ lia deziro li ne estis akceptita de prezidento Eisenhower, sed nur de vicprezidento Nixon. Tion li konsideris kiel humiligon. Post pluraj malamikaj agadoj ambaŭflanke kaj precipe post ripetaj provoj de CIA mortigi Castron, la kubano ŝanĝis sian sintenon kaj Usono fariĝis la unua malamiko de Castro, kio kaŭzis malbonegajn rilatojn inter ambaŭ ŝtatoj ĝis la nuna tago.

Interne, kiel oficiala politikisto Castro multon promesis. Li promesis, ke ministroj estu anstataŭitaj, se ili malbone plenumas sian laboron. Li promesis respekti la publikajn rajtojn kaj liberecojn. La revolucio celis esti humanisma, ĝi volis sekvi la trian vojon inter la okcidenta kapitalismo („libereco sen pano“) kaj la orienta socialismo („pano sen libereco“) – la tria vojo estus „libereco kaj pano“. Tamen, baldaŭ kiam tiuj promesoj kaj vizioj montriĝis iluziaj, la politiko de Castro kaj li mem perdis multajn apogantojn, precipe ĉe la urbaj mezaj tavoloj kaj la sindikate organizitaj laboristoj. Li ankaŭ distanciĝis de kelkaj malnovaj kunbatalantoj, kiuj elmigris, estis ĵetitaj en la prizonon aŭ mistere perdis sian vivon. En julio 1959 li elŝanĝis la personon en la ofico de la ŝtatrezidento, la burĝa liberalulo Manuel Urrutia estis anstataŭita de la komunisto Osvaldo Dorticos. En aŭtuno de la sama jaro okazis nova skandalo: Kiam Huber Matos (*1918), unu el la kungerilanoj de la ribelo post la alveno de ‚Granma‘ en Kubo, protestis kontraŭ la pli kaj pli forta influo de la komunistoj ĉirkaŭ Raúl Castro kaj Ĉe Guevara kaj avertis la danĝeron de komunista diktaturo, li ricevis seriozajn problemojn. Kiam Raúl fariĝis la estro de la armeo, Huber Matos demisiis kiel milita guberniestro de la provinco Camagüey. Li estis arestita, akuzita pro perfido kaj kondamnita pro kontraŭrevolucia agado al 20jara punaresto (kiujn li devis plene trapasi en la malliberejo), anstataŭ mortpuno (en 1979 li estis liberigita kaj elmigris al Usono, kie li ekaktivis en la ekzilkuba organizo, skribis libron kaj publike pledis favore al sankcioj kontraŭ Kubo, inkluzive de la ebleco likvidi la kuban ŝtatestron Fidel Castro).

Surbaze de sia socia deveno kaj de la politika evoluo dum iu tempo Castro ankoraŭ funkciis kiel peranto inter la revolucio kaj la burĝaj-liberalaj movadoj, kiujn li baldaŭ elŝaltis. Sed pli kaj pli la komunistoj, al kiuj sin kalkulis frato Raúl, transprenis respondecon kaj komencis glaciigi la situacion. Ŝajnas, ke Castro esperis, ke li povos kontroli la lojalajn komunistojn, ĉe kiuj cetere ne estis klare, ĉu ili submetiĝos al la nova *Máximo Líder* aŭ ĉu ili intencis senpotenci lin. Ŝajnas, ke la dua varianta preskaŭ efektiviĝis en 1962 kaj denove en 1968. Sed Castro konvene reagis al iuj konspiroj kaj ĝustatempe eliminis potencialajn danĝerojn. Dume Raúl kaj Ĉe Guevara akcelis la rilatojn kun la komunistaj ŝtatoj, sed Fidel restis skeptika. Nur post persona renkontiĝo kun Nikita Ĥruŝĉov rando de la UN-plenkunveno en 1960 li malrapide ĉesigis sian malfidon. La ‚kuba krizo‘ de 1962, kiu riskis novan mondmiliton, kondukis al nova streĉiteco kun la komunista ĉefpotenco. Castro ĉagreniĝis, ĉar Sovetunio retiris siajn raketojn sen konsulti la opinion de Castro. Malgraŭ tio Fidel fariĝis ‚Heroo de Sovetunio‘ (1963). La tensioj eĉ pli fortiĝis post la puĉo kontraŭ Ĥruŝĉovo en 1964 kaj pro la simpatio, kiun Ĉe Guevara esprimis por la maoismo kaj eĉ pli post intencita puĉo kontraŭ Fidel Castro, kiu estis planita de Aníbal Escalante en interkonsento kun Moskvo

fine de 1967.⁵ La stelo kaj la internaciismo de Fidel Castro komencis rapide velki, despli ke la komunistaj gvidantoj de la latinamerikaj ŝtatoj forlasis la kuban vojon kaj rekte sekvis la sovetian ekzemplon, dum Castro daŭrigis fokusigi sian propran internaciisman koncepton al la konflikto pri la „imperiismo“ kontraŭ la ‚Tria Mondo‘ kaj al la konflikto inter Nordo kaj Sudo. La pragan ribelon de 1968 Castro primoke kritikaĉis pro tio, ke laŭ li la ĉeĥoj postkuris la fruktojn kaj promesojn de la kapitalismo, sed Sovetunio li samtempe kritikis, ĉar laŭ li ĝi pekis, misatentante la rajton je suvereneco de la ĉeĥoj kaj slovakoj kaj rompante la internacian juron. Sed li ne ĉesis pravigi la ekziston de Sovetunio, kiu laŭ li garantiis la kontraŭpuŝadon de la imperiismo. Samtempe li mallaŭdis ĝin, ke ĝi ne sufiĉe sisteme kontraŭbatalis la influon de la „imperiismo“, inkluzive de Latinameriko kaj de la cetera Tria Mondo kaj do elpaŝis kiel dubinda moralapostolo de la revoluciaj principoj. Sed li komplete forgesis kaj neglektis la ekonomiajn problemojn. La komunismaj tendencoj en la politiko, la transformo de la kuba agrikulturo laŭ la maniero de sovĥozoj, kiu praktikis la konfiskon de la nordamerika terposedo, reagis la usonajn politikistojn, kiuj ĝis nun kun skeptika pacienco observis la evoluon en Kubo. Kiel poste fariĝis konate, dum la elektokampanjo de John F. Kennedy (1960) estis diskutite, ĉu oni forigu Fidel Castron de la povo, ĉu oni eĉ entute elŝaltu lin pere de murdatenco. Post iom da ŝanceliĝado pri la elektenda vojo vidalvide de Usono, ŝajnas ke Castro finfine lasis sin influi de Raúl kaj Ĉe Guevara kaj elektis la kolizian kurson kaj definitive rompis kun Usono ankaŭ eksterpolitike, despli ke Sovetunio pretis transpreni la nordamerikan pozicion en Kubo. Krom tio, tiu elekto estis ideologie kaj propagandisme oportuna kaj dezirinda. Tiel oni povis ilustrati la „ĉantaĝan politikon de la imperiistoj“. Al la konfisko de la nordamerika tero en Kubo Usono reagis per la fermo de la merkato por kuba sukero kaj enkondukis eksportan embargon por usonaj produktoj al Kubo. Al tiu embargo aliĝis inter 1964 kaj 1970 la plimulto de la latinamerikaj ŝtatoj, kun kiuj Castro sekve rompis la rilatojn. Tiel Usono fariĝis la konstanta kaj eterna traŭmato por Kubo, kaj Kubo por Usono, tiel ke Jean Paul Sartre, kiu tiutempe restadis en Kubo, sarkasme komentis la dilemon jene: „Se Usono ne jam ekzistus, oni devintus ĝin inventi por la revolucio de Castro.“ En tute alia senco tiu frazo validis por dekmiloj da kubaj elmigrintoj, kiuj tiam petis en Usono politikan azilon. La interna opozicio estis marĝenigita kaj ĝiaj anoj proklamitaj kiel ŝtataj malamikoj.⁶ La provo far kubaj elmigrintoj, kiu estis apogita de la usona sekreta servo, invadi la landon ĉe la sama Porka Golfo en aprilo 1962 fiaskis.

⁵ Fabian Escalante, la iama ĉefo de la kuba sekureco, kiu devis protekti ankaŭ Fidel Castron, asertis, ke al li estis konataj entute 638 murdatencoj kontraŭ Castro, kiujn preparis ĉefe CIA, ekzilkubanoj kaj la usona mafio. CIA konfirmis ĝis nun nur ok tiajn murdatencojn. Antaŭviditaj estis la apliko de plej diversaj rimedoj, de veneno ĝis bomboj. Ankaŭ la sankcioj de Usono kontraŭ Kubo celis la falon de Castro kaj la paralizadon de la kuba ekonomio en tiu grado, ke tiuj sankcioj kundukus ene de kelkaj semajnoj al la forigo aŭ likvido de Castro. Komence de majo 2004 Colin Powell, la tiama usona ministro pri eksteraj aferoj, submetis 500-paĝan raporton de la ‚Konsila Komisiono por libera Kubo‘, kiu antaŭvidis totalan ŝanĝon de la aferoj en Kubo ene de ses monatoj. Castro travivis dek usonajn prezidentojn, Obama estas la deknua.

⁶ Vd. http://en.wikipedia.org/wiki/Cuban_democracy_movement.

La rolo de la ideologio kaj ĝia efiko al la reala politiko

En tiu tempo Fidel Castro metamorfoziĝis, nomante sian revolucion socialisma kaj sin mem socialisto, kaj la unuan de decembro 1961 li proklamis sin „dumviva marksisto-leninisto“. Ŝajnas, ke nur per tiu ŝaktiro la pluekzistado de Fidel Castro kiel politika gvidanto povis esti sekurigita, ĉar ekzistis la danĝero, ke la malnovaj komunistaj funkciuloj povus ideologie superi kaj politike postkuri lin. Surbaze de la marksisma-leninisma platformo diversaj revoluciaj organizaĵoj estis kunigitaj, tiel ke en 1965 la Komunista Partio de Kubo (PCC) povis finfine naskiĝi. Ĝia unua sekretario fariĝis Fidel Castro. Povas esti ke por la iama etburĝa antikomunisto ne estis tro facile ŝanĝi la ideologian linion. Aliflanke li sentis sin libera interpreti la marksismon laŭ propra plaĉo kaj kaprico. La marksisma kompreno de Castro, kiu servis kiel ideologia preteksto, ne baziĝis je la dogmoj de la klasikaj marksismaj teoriistoj, sed estis influita de la specife kubaj cirkonstancoj, do por Castro la marksismo ne signifis sciencan sistemon, sed praktikan senton. Kompreneble, la ŝanĝoj en la ideologia koncepto kaŭzis malklaraĵojn kaj kontraŭdirojn en la politiko mem. Por nebuligi ilin Castro daŭre trovis kaj defendis novajn interpretojn de siaj motivoj kaj intencoj kaj tiel do ŝajnis logikan konsekvencon de la okazaĵoj, kiuj draste diferencigis de la imagita formo. La procezo devis esti eksplikita al grandparte tradicie ne- aŭ antikomunista publiko, kio estis alia defio, despli ke en Kubo la konstitucia demokratio ne havis tradicion kaj ne pli profunde atingis la socion. La tradicia oficiala politiko reprezentis esence la intereson de la grandaj terposedantoj, de la grandaj entreprenistoj kaj de la meza urbtavolaro, kio entute koncernis eble unu trionon de la popolo. La prezidento, kiu estis rekte elektita de la popolo, respektis la interesojn de la kamparanaro: ekzemple pere de taŭga socia politiko Batista kolektis en sia unua mandatperiodo multajn voĉojn de la malblanka laboristaro. Do, malantaŭ la prezidenta registara sistemo, kiun Kubo posedis laŭ la usona modelo, nur malbone kaŝiĝis la figuro de la Kaŭdilo, reprezentata en la persono de Fidel Castro. Apud kaj ekster la rilatoj inter la popolo kaj la Gvidanto ekzistis kaj ĝis nun ekzistas nur malmultaj eblecoj esprimi la politikan volon kaj nur malfortaj ŝancoj efike influi la registaran politikon. Castro funkcias kiel recepta organo, kiu akceptas dezirojn kaj bezonojn de la ‚popolo‘, li mem estas la organo, kiu formas la politikan volon, kiu interpretas kaj artikuladas la bezonojn, li mem estas la aganto, kiu efektivigas la socian dinamikon kaj ankaŭ garantias ĝian vivtenadon kaj li estas tiu, kiu donas al la ‚amasoj‘ la okazon por apliki iliajn kontrol-funkciojn. La kontrolado de la registaro okazas pere de la aŭditorio, kiun la Gvidanto mem elektas kaj (retorike) preparas, ekzemple la 23an de julio 1970, kiam Castro proponis sur la Revolucia Placo sian (fikcian) demision al la amasoj. Nature, la amasoj ne deziras lian demision. Tiel funkcias la ‚rekta demokratio‘ de Kubo, kaj la raraj balotoj, kiuj okazas en tiu lando, estas nomataj, de Castro mem, „sistemo de konstanta partoprenado de la laboristaj amasoj en la formado de la partio“. Do, en Kubo la partio funkcias pli kiel kontrolorgano, kiu influas kaj koordinas la produktoprocezon, malpli kiel organo de la potenco, kaj ĝi estas nehavebla por la efektivigo de la ekonomia politiko de la registaro. Samtempe en Kubo ĉio ŝajne dependas de la Gvidanto persone kaj de la persono Fidel Castro mem kaj de la lojaleco al li. Ĉe Guevara vidis en tiu potencakumulo de la Gvidanto danĝeron por la revolucio kaj strebis bridi ĝin pere de ‚aro de mekanismoj‘, sed Castro sukcese defendis sin kontraŭ la limigo de sia persona influo. Lia kaŭdilismo estas preskaŭ perfekta, same lia

arto kiel amasretorikulo, kiu kapablas hipnoti la amasojn, ŝanĝante diversajn rolojn, foje kiel akuzanto, defendanto, instruisto, batalanto, popoltribuno kaj profeto, kiu respektive reagis al la deziroj kaj bezonoj de sia publiko, tiel ke li mem konfesas, ke „kelkfoje oni ne scias, kiu parolas, ĉu oni mem parolas aŭ ĉu la popolo.“ En tio li kompreneble tute ne diferenciĝis de iu ajn faŝismo demagogo (ekzemple Mussolini). Ĉe Guevara tiel priskribis la fenomenon: Fidel kaj la amasoj komencas dialogon kun kreskanta intenseco ĝis ili atingas abruptan finalon, kies kulmino estas nia batal- kaj venkokrio. Sed kiel dirite jam en 1970 la populareco de Fidel Castro jam ne plu estis tiom forta kiel antaŭe, kiam li estis kun Ĉe Guevara. Specifa por Kubo estas ankaŭ la cirkonstanco, ke en komparo kun aliaj eksaj aŭ daŭraj ‚socialismaj’ landoj, ne ekzistas malgranda subprema aparato, kiu staras super la amasoj, kiel en Sovetunio, GDR, Bulgario, Albanio aŭ Nordkoreio, kaj ankaŭ la Gvidanto ne disvastigas la klasikan hororon kiel tion faris Stalin, Ceaușescu aŭ Pinochet, Stroessner aŭ la politika reĝimo reprezentata de ili. Aliflanke la aŭtoritateco de Castro, kiu ĉiam denove alvokas entuziasmon, disciplinon kaj patoson, havas ion arteficialan, ĉar la tuta kuba (pseŭdo-)ideologio estas arteficiala. Evidente ĝi servas al la seninterrompa mobilizado de la amasoj kaj al ilia maksimuma politika kaj ekonomia utiligo (aŭ ekpluatado). Anstataŭ klasika subprema aparato kun ampleksa kaj bone organizita sekureca servo konata de totalismaj reĝimoj, en Kubo ekzistas sociaj strukturoj (kiel diversaj organizoj kaj komitatoj), en kiuj ĉiu kontrolas ĉiun kaj en kiuj ĉiu sentas sin kontrolata de ĉiu, do temas pri speco de ‚demokratia’ kontrolado aŭ ‚kontroldemokratio’. En tio nature ĉia kritiko kontraŭ la registaro fariĝas praktike granda problemo, ja apenaŭ ebla, kiel montras la ne malofta malaperigo, enprizonigo kaj likvido de ‚disidentoj’, kiuj fariĝis danĝeraj por Castro kaj ties regado. En emancipiĝinta moderna mondo tio estas eksmoda sistemo eĉ por Kubo, kiun la komputiloj kaj poŝtelefonoj intertempe ankaŭ atingis, dum en ĉiuj ĉirkaŭaj socioj la individuo kontrolas sin mem, eble eĉ en Venezuelo kaj Nikaragvo. Do, kvankam Fidel Castro ne estis la tipo de la klasika ideologo en la severa marksisma senco, eble eĉ ne la klasika diktatoro aŭ tirano, kiel oni riproĉis lin, li restis partikulara speco de (duon)dio, guroo aŭ papo por Kubo, kaj (duon)dioj, gurooj kaj papoj kiel konate ne eraras kaj ĉiam pravas. Pli gravaj ol rigidaj dogmoj estas por li la subjektivaj opinioj, granda estas lia respekto antaŭ kuraĝaj kaj aŭdacaj faroj aŭ de la decida entuziasma partopreno, inkluzive de Esperanto, kiel montris la unika kongresa jaro 1990, en kiu Castro nomis sin „soldato de Esperanto“ kaj demonstris grandan interesiĝon por tiu ĉi planlingva movado. La fortoj de la subjektivismo, voluntarismo kaj pragmatismo ja sufiĉis por inici la revolucion, sed ili evidentiĝis tro malfortaj por povi daŭre teni ĝin. Castro posedis tro malmulte da teoriaj kapabloj (aŭ interesoj) por liveri unu en si koheran ideologion; ĝuste tiu ĉi tasko estis transprenita de Ĉe Guevara, sed li devis, aŭ volis, cedi. Castro alproprigis ĝin, tradukis ĝin en la lingvon kaj pensadon de la simplaj homoj, faris el ĝi propran socialismon kaj (mis)uzis ĝin por siaj propraj regadointeresoj. La granda malavantaĝo de Fidel Castro konsistis en tio, ke li ne kapablis elteni kritikon kontraŭ lia politiko kaj kontraŭ lia persono, kio signifis, ke kritikantoj estis konsiderataj kiel perfiduloj kaj devis kalkuli pri gravaj sankcioj. En tio ĉi konsistis samtempe la senskrupuleco kaj brutaleco de Fidel Castro, kiu ĝis sia vivofino restas militisto, eĉ en la gimnastika vesto, kiun la maljuna sportisto portas en la hospitalo.

Fiaskinta kastrismo

Kubo suferis saman gravan problemon kiel la ceteraj socialismaj landoj. Ankaŭ Kubo estas perfekta ekzemplo por montri, ke malgraŭ ĉiaj entuziasmaj kaj entuziasmigaj sloganoj, la vivnivelo de la popolo daŭre falis – grandparte pro la kulpo de unusola persono kaj ties rigida menso, Fidel Castro. Jam komence de la 70aj jaroj daŭre mankis bazaj konsumvaroj, en la vendejoj oni povis aĉeti preskaŭ nenion sen rajtigaj kuponoj, sed aliflanke malmultekostaj aŭ senpagaj publikaj servoj estis je la dispozo, sed la kvalito de tiuj fariĝis pli kaj pli dubindaj. Pro tio en Kubo la homoj konsideras, ke apenaŭ valoras la penon labori kontraŭ (aŭ por) mono. La ĝustajn, logikajn konsekvencojn el tiu mizero Castro neniam tiris; se oni jam abomenis la monon, oni povintus anstataŭe praktiki efikan stimoladon de la laboro mem. Sed male, oni fantaziiis pri „produkti novan homtipon kun nova tekniko“. Intertempe la tuta mondo, eĉ rusoj kaj ĉinoj, la protagonistoj de la ideo krei novtipan homon, ridas kaj mokas pri similaj sensencaj ideoj.

Por resti ĉe la fortaj flankoj de Castro: Sendube, Fidel Castro donis multon, sed nur al specifaj elektitaj tavoloj: Li donis egalecan socian konstitucion, precipe la socialan egaligon de la malblankuloj, certagradan altigon de la vivnivelo por la antaŭe senlaboraj kaj senposedaj kamparanoj (reguligita laboro, digna loĝejo), inkluzive de ilia alfabetigo kaj per tio la altigo de la ĝenerala kleriga nivelo kaj de la pli altnivela sansistemo. Krom tio, Castro donis al la kubanoj novan valorsenton, specon de misiosento por Latinameriko. Sed Castro fiaskis fakte jam sufiĉe frue kun la celo, kiun li proklamis post la transpreno de la povo: sanĝi la kuban socion kaj redoni al ĝi la kondiĉojn de libereco kaj juraj rajtoj. La kuba evolumodelo estis interesa en la 60aj jaroj ankaŭ por aliaj evolulandoj. Sed oni tro promesis kaj la ekonomio kabeis jam en 1969/1970, kiam la socia produkto de Kubo falis al la nivelo de 1958. Sur la ekonomia kampo Castro maltrafis la aliĝon al evoluoj, por kiuj en Kubo antaŭ Castro la ekonomia kaj infrastruktura bazo ekzistis. Post la epoko de la industriismo, inicita de Ĉe Guevara, sekvis la periodo de la agrikulturismo, defendata de Castro.⁷ Anstataŭ purigi la propran domon, Kubo enmiksiĝis per armeo en diversaj konfliktoj, sendante soldatojn al fremdaj landoj en Ameriko kaj Afriko por apogi la komunistajn partiojn, en Nikaragvo, Angolo,

⁷ Ĉe Guevara frue ekkonfliktis kun Castro kaj kun la komunistoj. Dum Castro restis pli pragmata, Ĉe Guevara komencis revii pri la idealoj de la ĉina komunismo, propagandis la planekonomion kaj pledis por la totala ŝtatigo de la kuba ekonomio. Sub la ekonomia ‚gvido‘ la kuba ekonomio draste malboniĝis. Okaze de parolado kiel estro de la kuba UN-delegacio en Novjorko en 1964 Ĉe postulis la kopiadon de la kuba revolucio en aliaj landoj. Dum sia restado en Alĝerio en 1965 li kritikis Sovetunion, kio kondukis al la fortiĝo de la konflikto kun Moskvo kaj kun la kuba registaro mem. Revenante al Kubo, Ĉe pli kaj pli malaperis el la publika vivo, tiel ke li forlasis la landon en formo de kaŝita komercisto por daŭrigi la lukton en Kongo. Fine de 1965 li revenis al Kubo, sed jam la venontan jaron li iris al Bolivio por daŭrigi la revolucion kontraŭ la registaro, sed tiu batalo fiaskis. En oktobro 1967 Ĉe Guevara estis kaptita kaj mortigita, la 9an, sen antaŭa jura procezo, sed laŭ la ordono de la bolivia prezidento René Barrientos Ortuño far Mario Terán, serĝento de la bolivia armeo, kiu anoncis sin libervole por ekzekuti la ribelulon en la vilaĝo La Higuera (kie ekzistas monumento). La likvidon de Ĉe Guevara kunaranĝis la usona sekreta servo CIA. Ĉe estis metita sur katafalko kaj montrita al la gazetaro. Postmorte Ĉe estis mitigita kiel sanktulo kaj fariĝis internacia legendo. Precipe en Kubo Ĉe Guevara estas konsiderata kiel popola heroo. Post kiam oni malkovris la tombon de Ĉe Guevara en Bolivio, liaj restaĵoj estis transdonitaj al Kubo, kie en oktobro 1997 oni entombigis lin en la maŭzoleo en Santa Clara kun ĉiuj ŝtataj honoroj.

Mosambiko kaj Etiopio. Parto de la kuba ‚internaciisma’ programo estis ankaŭ la dissendado de kuracistoj, fakte ĉirkaŭ 15’000, inter alie al Venezuelo, unu el la malmultaj amikoj de Kubo.

Malsaniĝo kaj malapero de Fidel Castro el la publikeco

Castro okupis samtempe la postenojn de la ŝtata prezidento, de la prezidanto de la ŝtata konsilantaro kaj de la estro de la ministraro, same li estis, en la rango de Comandante en Jefe, ĉefkomandanto de la kuba armeo, unu el la plej fortaj en Latinameriko. Kaj nelaste li estis la unua sekretario de la Komunisma Partio de Kubo. Ĉirkaŭ Castro estis konstruita senprecedenca personkulto, sed Castro mem rifuzis la aserton, ke ĉirkaŭ li ekzistas persona kulto.

La 20an de oktobro 2004 Castro falis okaze de publika manifestiĝo sur ŝtuparo kaj frakasis la maldekstran genuon kaj rompis la dekstran brakon. Multaj gazetoj sentis sin provokitaj publikigi la sensacion, ke Castro ‚falas“ en politika senco. Post grava malsano ĉe la intestoj, la 1an de aŭgusto 2006, Fidel Castro transdonis siajn funkciojn provizore al la pli juna frato Raúl (*1931). La 17an de decembro 2007 Fidel Castro anoncis perletere, ke li intencas retiri sin de ĉiuj siaj oficoj. Laŭ komuniko de la gazeto *Granma* li efektivigis tiujn intencojn la 19an de februaro 2008, kaj la 24an de februaro la parlamento elektis lian fraton Raúl⁸ kiel posteulon de Fidel en la ofico de la ŝtatprezidento. Ekde tiu tempo Fidel Castro estis tre malofte vidata aŭ aŭdata en la publikeco. Liaj regulaj ‚reflektoj’ (aŭ ‚meditadoj’) aperadas en la partia organo *Granma* kaj parte en interreto en diversaj lingvoj.⁹

Krom tio aperis preskaŭ 800-paĝa libro¹⁰, kiu enhavas intervjuon, kiun la hispana inĝeniero kaj sociologo Ignacio Ramonet (*1943), iama direktoro (1991-2008) de *Le Monde diplomatique* kaj poste eldonisto de la hispana versio de tiu gazeto, krome honora prezidanto de Attac, faris kun Fidel Castro. En tiu intervjuo Fidel Castro ricevis larĝan spacon por prezenti siajn proprajn vidpunktojn, dum kritikaj demandoj al la iama ĉefrevoluciulo grandparte mankas. Anstataŭ kritika traktado de la verko de Castro, Fidel kaptis la okazon prezenti sin kiel ‚Opoziciulon numero unu“ kaj kiel modeste salajritan ‚Laboriston de la Revolucio“. La fakto, ke Ramonet, kiu cetere direktas abundajn laŭdojn al la adreso de la unua kubano, ne surbendigis la konversaciojn kun Castro, sed poste rekonstruis ilin laŭmemore kaj eĉ submetis la tekston al la intervjuito, por ke li povu kompletigi, redakti kaj plibonigi ĝin, ne faras la intervjuon aparte aŭtentika aŭ kredinda. Malgraŭ ĝia interpreta kaj instrua unuflankeco, la libro enhavas ankaŭ multajn interesajn historiajn detalojn rakontitajn el unua mano, pro kio la volumo vekos verŝajne ĉefe la atenton de historiistoj.

⁸ Pro sia azieca ekstera aspekto, kiu komplete diferenciĝas de tiu de Fidel, la popolo moknomas lin ‚ĉineto“. Aperis eĉ duboj, ĉu Raúl entute estas la frato de Fidel.

⁹ Ekzemple: <http://www.cuba.cu/gobierno/discursos>, <http://www.embacubalebano.com/fidel2010e.html> kaj <http://fidelcastroarchiv.blogspot.com>.

¹⁰ Originala titolo: Fidel Castro. Biografía a dos voces. 2006.

Parencoj de Fidel Castro kaj la estonteco de Kubo

La filo de Fidel Castro el la unua geedzeco kun Mirta Díaz-Balart, Fidel Castro Díaz-Balarto (*1949), nomata Fidelito, estas doktoriĝinta nuklea fizikisto ĉe la kuba Akademio de Sciencoj. Li kunlaboris en la fiaskinta kuba nuklea programo. El la dua geedzeco kun Dalia Soto de Valle estiĝis kvin filoj, kaj la rezulto de la sengeedza rilato kun Natalia (Naty) Revuelta estas la filino Alina Fernández Revuelta (*1956), kiu vivas en Usono kaj kiu estas konsiderata kiel unu el la plej akraj kritikantoj de la patro.

Hodiaŭ la situacio de Kubo ne estas pli bona, malgraŭ konsiderindaj enspezoj el turismo kaj malgraŭ la forfalo de la socialismo en la mondo. La lando estas politike kaj ekonomie grandparte izolita. Kvindek jarojn post ilia revolucio la kubanoj, kiuj rigidiĝis en sia karibia insulbunkro, kiun ili ne rajtas forlasi kaj kiun la eksterlandaj turistoj nutras per dolaroj, mem devas pagi tre altan prezon por la fiaskinta eksperimento de la kastrismo, kiun la kubanoj subtenas ĝis nun. Sed la ekonomiaj ciferoj eble povus esti eĉ pli malbonaj. Se oni povas fidi tiun statistikon, laŭ la bruta enlanda produkto (BEP) po enloĝanto (2586 USD) resp. laŭ aĉetpoveco po enloĝanto (3784 USD), Kubo troviĝas ie meze de la internacia skalo antaŭ landoj kiel Dominikana Respubliko, Mjanmaro, Bosnio, Jordanio, Gvatemalo, Ĉinio, Indonezio, Irako, Hindio, Nikaragvo, Honduro, Bolivio, ktp., sed malantaŭ Peruo, Kolombio, Ekvadoro, Irano, Paragvajo, Gvatemalo, Ĵamaiko, Salvadoro, ktp. – temas plejparte pri fiaskintaj, obskuraj, paranojaj kaj danĝeraj ŝtatoj triamondaj sen perspektivo (krom kun la atombombo), kiuj kaŭzas nur kaprompadon al la mondonantoj, ĉefe nordamerikaj kaj eŭropaj, kiuj devas zorgi, ke tiuj ŝtatoj ne totale kolapsas kaj ne tiras aliajn ŝtatojn en la abismon.¹¹

La ĉefa kaj esenca demando estas: Kio okazos post la *morto* de Fidel Castro ? Ĉu lia frato Raúl, la maljuna komunisto, kiu ĉiam staris en la ombro de Fidel kaj kiu ĝis nun ne postlasis aparte pozitivan impreson, savos, povos savi sian landon, aŭ ĉu tion devos fari aliaj, ekzemple, usonanoj kaj ekzilkubanoj ? Ĉu tiam okazos finfine la longe atendata ‚renversa’ revolucio ?

Cetere, la usona magazino *Forbes* taksis la monposedon de Fidel Castro je 900 milionoj da dolaroj, sed tio estas tre dubinda aserto. Castro mem replikis, ke li ne posedas bankkonton en eksterlando.

Spegulo

¹¹ Kubaj indikoj pri la bruta socia produkto mankas. BEP-komparo kun iuj eŭropaj landoj: Moldavio (603/1876 USD), Albanio (3021/5613 USD), Makedonio (3090/8660 USD), Slovenio (19510/23826 USD), Greklando (20754/23006 USD), Germanio (36646/31823 USD), Norvegio (61255/45023 USD), Luksemburgio (80040/68724 USD), Usono (48437/44966 USD).